

# La Progreso

REDACTIE-  
COMITĖ

G. P. DE BRUIN

G. J. DEGENKAMP

F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE FEDERATIE  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**

IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.

Postgiro 111278

W. F. KRUIT

H. KUYT

JAC. LEM JR.

H. VAN LIER

J. VAN SCHEEPEN

H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADMINISTRATIE: G. J. DEGENKAMP, POSTBUS 8002, AMSTERDAM-W

## Ĉu erara aŭ ne?

Jen demando, kiu al komencantaj esperantistoj ŝajnas iom stranga. Esperanto — tiel ili rezone respondas — estas ja lingvo kun logike konstruita kaj rigora gramatika sistemo, kun vorttrezoro, kies elementoj havas fiksitajn kaj nedubeblajn signifojn; lingvo, en kiu mankas la dubindaj kaj erarigaj neregulaĵoj, pri kiuj la naturaj lingvoj estas tiom „riĉaj"! Ĉu pro tio ne estas facile unuarigarde konstati kio estas erara kaj kio ne?

Kaj tamen, malgraŭ tiu prava rezono ekzistas en la praktika uzado de Esperanto pluraj gramatikaj formoj, vortkonstruoj, sintaksaj rimarkindaĵoj, pri kiuj la gramatikistoj havas inter si diferencajn opiniojn. Kion unu rigardas nepre erara, tion alia samforte opinias la sole korekta formo.

Antaŭ la lasta milito diversaj Esperanto-gazetoj, unuavice „Heroldo de Esperanto", okupis sin pri tiu problemo; ankaŭ ni kelkfoje esprimis nian opinion pri iaj aspektoj de tiu temo. Sed kontentigan solvon oni ne atingis. Ni menciis nur la polemikojn pri transitivaj kaj netransitivaj verboj, pri adjektivo aŭ adverbo post „ŝajni", pri „tiom" aŭ „tiel", pri la modo post „kvazaŭ", pri „dum kiam" anstataŭ „dum", pri „io" kaj „ujo", pri la ĝusta senco de iu afikso, pri la kompleksaj verboformoj, kaj precipe pri la prononcado.

Konsiderante tion ĉi, oni ne povas ne veni al la konkludo, ke la gramatiko, kia Zamenhof ĝin konstruis, ne estas tiom perfekta, ke ĝi superas ĉian ajn kritikemon. Se ĝi ja estus perfekta, jam ne ekzistus motivoj por uzi kaj defendi formojn aliajn ol la oficialajn. Kaj se ĝi ne estas perfekta, ĉu Zamenhof intence lasis en sia gramatiko dubindajn punktojn, iajn malplenojn, aŭ ĉu li mem kredis ĝin perfekta, tamen ne antaŭvidante la konsekvencon de sia nur-16-regula gramatiko, ke poste la gramatikemuloj kopodos plidetali ĝin? Ankaŭ pri tio oni multe diskutis, sed kun certo neniu povas ion diri; oni nur konjektas.

Flanke lasante tiun demandon, certe neniam solveblan, ni okupos nin en sekvontaj artikoloj pri la diferencaj opinioj, regantaj pri diversaj lingvaj elementoj.

# Por Komencantoj

H. Kuyt.

Vertalingen voor deze rubriek zende men vóór 10 April aan het redactieadres: Postbus 8002, Amsterdam-W.

Opgave 3.

Gisteren ontmoette ik kameraad Bakker, hij zei, dat hij naar het postkantoor ging.

Ik vroeg hem, of hij ook wist, waar ons congres dit jaar plaats vond. Hij antwoordde, dat het congres van de federatie dit jaar in Alkmaar plaats zou vinden, op twintig, een en twintig en twee en twintig April. „En”, vroeg ik verder, „gaat U daarheen?”

„Laten we samen gaan”. „Het spijt mij zeer”, antwoordde hij, „ik ging zeker, als ik maar geld had”. „Weet U dan niet dat onze groep een spaarkas heeft, opdat iedereen kan deelnemen?” „Zulke congressen zijn zeer leerzaam, men spreekt er slechts Esperanto.” „Dat is waar, want om een goed esperantist te worden is het nodig, dat men Esperanto spreekt.

Velen van onze leden zouden goede esperantisten zijn, als zij op de bijeenkomsten slechts Esperanto spraken. A.s. Dinsdag houd ik een redevoering over de klassieke Esperanto-literatuur.” Zoudt U mij ook kunnen zeggen, wat klassieke literatuur is?” Als klassieke literatuur beschouwt men de werken van Dr. Zamenhof, Kabe en enkele anderen, door hun voorbeeldige stijl.

---

---

## La vorto „fakte” fakte faktas tro fakte

La vorto „fakte” fakte estas logike ĝusta, sed praktike ĝi fakte estas uzata en nebonaj sencoj. „Fakte” estas fakte vorto, por kiu oni en diversaj lingvoj fakte havas ekvivalenton, fakte ne facile tradukeblan. En la nederlanda lingvo „fakte” estas fakte la traduko de „feitelijk”, sed laŭkutime ĝi fakte fariĝis la traduko de „eigenlijk”.

La unuaj esperantistoj, fakte laŭ ekzemplo de Zamenhof, tradukis „eigenlijk” per „propre”, sed tiu traduko fakte montriĝis nekontentiga. Poste oni eltrovis la vorton „verdire”, kiu fakte estas belsona, sed pro sia tro multa uzado fakte fariĝis enuiga. Fine enkondukiĝis la vorto „fakte”; sed dum la lasta jardeko „fakte” estas fakte tiom ofte, tiom neĝuste kaj fakte tiom senbezone uzata, ke fakte fariĝas tempo, ke la esperantistoj, fakte la nederlandaj, bone pripensu la sencon kaj elektu por ĉiu signifo fakte la ĝustan vorton, fakte uzante „fakte” nur por tiuj faktoj, en kiuj „fakte” fakte signifas nur „fakte”, kaj fakte ne ion alian.

La redakcio volonte atendas korektojn de tiu ĉi „fakte” tro faktoplena faktaro por publikigo en proksima numero.

Een uitvoerige behandeling van alle voorzetsels en z.g. voorzetselbepalingen, met talloze voorbeelden toegelicht, vindt u in

## DE VOORZETSELS

f. 1.50

LIBROSERVO F.L.E. ★ Postbus 8002, Amsterdam-West.

# De Komencanto al Progresanto

Jac. Lem.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

## De vos, de' wolf en het paard.

Een jonge, maar zeer slimme vos zag voor het eerst van zijn leven een paard. Dadelijk ging hij naar een wolf, het onnozelste dier van zijn soort.

„Mijn waarde”, zei hij tot den wolf, ga vlug met mij mee, dan kun je een groot en mooi dier zien, dat in de naburige weide graast”.

„Is het sterker dan wij?” vroeg de wolf.

„Ik geloof het niet, het ziet er heel kalm uit. Ik kan het je niet beschrijven, maar kom en oordeel zelf. Wie weet, misschien is het (wel) een prooi, die de fortuin ons aanbiedt.”

Zij gingen er heen.

„Mijnheer”, zei de vos, „uw nederige dienaren zouden graag uw naam vernemen”.

Het paard, dat niet zot was, en dat geenszins gerust was bij het zien van de beide bezoekers, antwoordde: „Mijn naam, heren, kunt gij lezen, mijn schoenmaker heeft het onder mijn zool geschreven”.

De vos antwoordde met een onnozel gezicht, dat hij niet lezen kon.

„Mijn ouders”, zo zeide hij, „zijn arm en hebben mij nimmer naar school gezonden. Die van mijn metgezel zijn echter rijk en hebben hem een uitstekende opvoeding gegeven, hij is een geleerde van de eerste soort: handschriften, opschriften, medailles enz. kan hij zonder moeite ontcijferen”.

Gevleid door die woorden kwam de wolf naderbij.

Het paard hief een zijner achterpoten op en gaf den armen wolf zo'n schop, dat hij als een bal over de grond rolde.

„Kameraad”, zei de vos toen, „dat was een harde (*severa, suferiga*), maar nuttige les (*instruo*). Dit dier heeft op je kaak geschreven, dat een wijze alles, wat hem onbekend is, met wantrouwen tegemoet moet treden”.

Vertaling van opgave 2.

## La negro.

Jakobo kaj du el liaj amikoj iun vesperon kune alvenis al iu hotelo en Nov-Jorko por tie pasigi la nokton (por tranokti). Estis nur unu lito neokupita; ĝi eble sufiĉus por du el la vojaĝantoj, sed la tria en tiu okazo devus kontentigi sin per brakseĝo. Negro, kiu vidis la embarason de la hotelmastro kaj de la tri amikoj, proponis dividi kun unu el ili sian liton. Tiu ĉi tiom afable proponita ofero estis danke akceptata de Jacobo. Baldaŭ li enlitigis, ordoninte al hotelservisto veki lin matene je la kvina.

Kiam li dormis, liaj du amikoj decidis fari ŝercaĵon (petolajon). Ili prenis iom da fulgo kaj nigrigis lian vizaĝon, tiel ke ŝajnis, kvazaŭ kuŝas en la lito du negroj.

Jakobo estis vekata je la li difinita horo. Starante (kiam li staris) antaŭ la spegulo por kombi sian hararon (siajn harojn), li vidis sian nigran vizaĝon.

„Ho! ho!” li ekkriis, „jen tiu stulta servisto eraris; li vekis la negron.”

# Vortoj kaj Esprimoj el Milita Tempo

(Daŭrigo)

ausradieren	= forviŝi	lagerhuis	= malsupera ĉambro
Ausweis	permesilo, liberigilo	legitimatie	= legitimilo
barak	barako	leider	gvidanto
Beauftrachte	komisiito	luchtafweergeschut	= kontraŭaviadila kanono
biscuit	biskvito	luchtalarm	proaviadila alarmo
blokkeren	= blokadi	luchtveiligheidsdienst	= kontraŭaviadila servo
bombardementsvliegtuig	= bombardilo, bombaviadilo, bombardarda aviadilo	Luftwaffe	aermilitistaro, militaviadilaro
bommenwerper (kiel supre)		magnetische mijn	magneta mino
bon	kupono	mijnenveld	minarejo
broodbon	pankupono	neutraliteitswet	= neŭtralecleĝo
commissaris der provincie	= provinci-estro	ondergrondse	kaŝlaborant(int)aro
concessie	koncesio	oorlogsmisdadiger	= militkrimulo
congres (amerika)	= kongreso	penetren	penetri
deporteren	ekzili	quarantainekamp	= kvarantenejo
dieptebom	= profundobombo	raad van state	= ŝtata konsilantaro
dominion	= kronlando	senaat	senato
duce	gvidanto	schuilkelder (kontraŭaviadila)	rifuĝejo
egel	pikstango	tank (reservoir)	= cisterno
falange	= falango	tank (oorlogswagen)	= tanko
Führer	gvidanto	tankschip	= cisternŝipo
gelijkschakelen	= samdirektigi	teutoon	= teŭtono <sup>2)</sup>
hakenkruis	= hokokruco	vakgroep	metia, profesia grupo, gildo
hogerhuis	supera ĉambro	verduisteren	mallumigi
hun	huno <sup>1)</sup>	vergassen	= ĝasmortigi, gasveneni
invasie	invado	vuurweep	= fajrovipilo
interneren	= internigi	wachtgeld	neaktivula salajro
jager	ĉasaviadilo		
jeep	universala aŭto, jipo <sup>2)</sup>		
krijgsgevangene	militkaptito		
krijgsgevangenkamp	= militkaptitejo		

Kritikon pri tiu ĉi listo ni volonte akceptos.

En sekvonta numero ni komencos pritrakti la dume jam ricevitajn kritikojn.

## Vi demandu - Ni respondos

Ĉu la traduko en „Taglaboristoj”, sur paĝo 13la: „*Antaŭ la fermiĝo de la ĉerko venis la najbarinoj*” estas ĝusta? Miaopinio ne, ĉar la ĉerko ne *fermiĝas*, sed oni *fermas* ĝin. Teorie vi pravas, sed praktike oni tamen ofte uzas la formon kun *iĝ* por la pasiva ago (*esti fermata*), kaj la sensufiksita formon por la ago aktiva (*fermi*), ĉar verba substantivo kun pasiva senco (het sluiten — gesloten worden) ne ekzistas en Esperanto.

### Mistifikajo.

Kampano, kiu dank' al la talento de iu advokato, sin estis savinta el malbona afero, promesis al sia konsilinto sendi al li leporon.

Post tri semajnoj la advokato renkontis sian klienton kaj demandis al li, kiam li plenumos sian promeson.

„Kiell!” ekkriis la kampano, „ĉu la leporo ne alvenis?”

„Ne.”

„Nekompreneble, ĝuste hieraŭ mi ĝin sendis.”

„Kion vi diras?”

„Jes, mi vidis leporon kuranta al la arbaro kaj mi kriis al ĝi: „Tuj iru al sinjoro M., la advokato, en tiu strato aŭ alia, je tiu numero aŭ alia.”

# Por Progresantoj

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men in vóór 10 April, Postbus 8002, Amsterdam-W.

Opgave 4. Vertaal in Esperanto:

Aardolie en al zijn producten zijn gedurende de laatste veertig jaren steeds belangrijker geworden. Zonder benzine kunnen we ons thans de samenleving niet meer indenken. Maar het is wel eens aardig te bedenken, hoe ook zij ons weer een prachtig voorbeeld geven van de macht van het kleine.

Want al die milliarden tonnen olie, die de aarde ons leverde of nog leveren zal, waren eens kleine oliedruppeltjes, die als reservevoedsel opgehoopt waren in microscopisch kleine plantjes en diertjes, die in een tropische zee leefden. In ongetelde en ontelbare scharen leefden en stierven ze daar. Hun dode resten zonken op de bodem en werden bedekt en vermengd met slib. Gedurende miljoenen jaren zonken ze steeds dieper weg en door de hitte, die in diepere niveaus van de aarde heerst, werd uit hun reserve-voorradjes de olie gevormd. C. v. R.

Daar in het vorige nummer de gelegenheid ontbrak het ingezonden werk van opgave 1 te bespreken zullen wij nog enkele fouten in het kort behandelen.

1. Velen schreven voor in de aanvang: *Se vi sentus vin...* De zin geeft een veronderstelling, niet een onmogelijkheid; *us* is dus niet op zijn plaats.

2. „Let eens op”. *Eens* is niet: eenmaal, doch: op zekere tijd, iam. *Unufoje* mag niet gebruikt worden.

3. *Animstatebla* is geen juiste vertaling voor: aan stemmingen onderhevig zijn. *Ebla* betekent: kiun povas...i. Het moet dus gebruikt worden met een overgankelijk werkwoord. *Stati* betekent esti en iu stato, is dus onovergankelijk.

4. De ene mens meer, de andere minder. Als men vertaalt met: *la unua homo*, dan zegt men: de eerste mens, wat hier niet de bedoeling is.

5. Tante zal komen logeren. *La onklino venos gastonta*. *Venos* geeft reeds de toek. tijd aan. In die tijd heeft het „gasti” plaats, dus *gastanta*.

Interessant is het de verschillende vertalingen voor eenzelfde uitdrukking met elkaar te vergelijken.

Met opstaande veren = *kun leviĝantaj plumoj, starplume, elstarantaj plumoj, hirtigitaj plumoj*.

Uitjubelen = *ĝojekkrii, ĝojkriante, ĝoje flutante, kantegantan, jubilanta, ĝojkriadegos*.

Ook hierin schuilen verschillende fouten.

Overigens lijkt het ons gewenst, dat zij, die de meest elementaire kennis der taal nog niet bezitten, een minder moeilijke taak uitkiezen. Fouten als: *resonas pli longa*; *antaŭ la 25 an*; *saniĝi* (d.e. *pliboniĝi*); *tio* (d.e. *ke*) die menigvuldig in eenzelfde tekst voorkomen, bewijzen dat men nog niet bij machte is de gegeven leerstof te verwerken.

Vertaling van opgave 2.

Daar zij 1) een zuiver voorwaardelijk middel van wederkerige verbinding voorstelt, zal de internationale taal, gelijk elke internationale taal, slechts in dat geval goed haar doel bereiken, indien iedereen haar geheel 2) gelijk gebruikt; en opdat ieder de taal gelijk kan gebruiken 3), is het nodig, dat er enige modellen bestaan, die voor ieder de richtlijnen 4) aangeven. Dit is de oorzaak, waardoor ik, zwichtend voor het verzoek van vele esperantisten, de „Fundamenta Krestomatio” uitgaf, die ieder zal kunnen dienen als model van Esperanto-stijl en die de taal tegen een vernietigend uiteenvallen in verschillende dialecten zal kunnen beschermen.

De taal leren kan iedereen met alle boeken, die hij wenst; maar daar veel Esperantoboeken zijn geschreven door personen, die de taal Esperanto nog niet goed kennen 5) en een beginnende Esperantist niet kritisch genoeg daar tegenover staat, daarom is het gewenst, dat ieder, voordat hij met het lezen van de Esp. literatuur begint, de F. K. met aandacht doorleest. Zonder van de leerling de mogelijkheid weg te nemen zich alle verrijkingen en regelmatig gemaakte verbeteringen, die hij in de literatuur vindt, kritisch toe te eigenen, zal de F.K. hem voor altijd behoeden

# De werkwoorden

## Verbale zelfstandige naamwoorden

Of zelfstandige naamwoorden in deze verhandeling thuis horen? Deze zeker, want logisch is er geen verschil tussen deze zelfstandige naamwoorden en de onbepaalde tijd van het werkwoord. Het verschil tussen beide berust alleen op beider grammaticale karakters. Beide zijn eigenlijk overgangsvormen tussen werkwoord en substantief, en beide hebben met elkaar gemeen, dat zij geen eigen onderwerp kunnen hebben. Het onderwerp bij een onbepaalde wijs is immers eigenlijk onderwerp van de vervoegde vorm, waarop de onbepaalde wijs volgt. Een ander punt van overeenkomst is ook, dat beide woorden zowel als onderwerp dan wel als voorwerp kunnen voorkomen (*labori estas utile* en *laborado estas utila* naast *mi ŝatas labori* en *mi ŝatas laboradon*).

Verbale zelfstandige naamwoorden stellen werkingen als zelfstandigheden (ideeën) voor en worden grammaticaal als zelfstandige naamwoorden behandeld.

### 1. VERBALE SUBSTANSTIEVEN IN HET NEDERLANDS EN IN ESPERANTO.

Het Nederlands zowel als Esperanto kent twee soorten verbale zelfstandige naamwoorden. Die der eerste groep stellen als regel de werking als een enkel geval voor. Die der tweede groep de werking in ruimer, meest langduriger betekenis.

In het eerste geval wordt in het Nederlands het zelfstandige naamwoord door een wijziging uit de stam van het werkwoord verkregen: *val* van *vallen*, *hoop* van *hopen*, *loop* van *lopen*, *gang* van *gaan*, *schrift* van *schrijven*, *bouw* van *bouwen*, *rit* van *rijden*, enz. In Esperanto verkrijgt men zulke zelfstandige naamwoorden door eenvoudige vervanging van de uitgang *i* door *o*: *falo*—*fali*, *espero*—*espero*, *iro*—*iri*, *skribo*—*skribi* enz.

In het tweede geval ondergaat het werkwoord in het Nederlands geen enkele wijziging. Dat het een zelfstandig naamwoord is geworden, is alleen te zien aan de mogelijkheid het lidwoord *het* er aan toe te voegen: *het werken*, *het lopen*, *het gaan* enz. In Esperanto vormt men deze woorden als regel door middel van het achtervoegsel *ad*: *laborado*, *irado*, *skribado* enz.

Maar, terwijl het in het Nederlands niet mogelijk is van alle werkwoorden deze twee soorten verbale zelfstandige naamwoorden af te leiden, is die dubbele afleiding in Esperanto wel mogelijk. Wel hebben we dus naast elkaar: *verlies*—*verliezen*, *hulp*—*helpen*, *klap*—*kloppen*, *slag*—*slaan*, *schrift*—*schrijven*, *gebed*—*bidden* enz., maar bijvoorbeeld naast *vertalen*, *tekenen*, *lezen*, *leren* enz. bestaat geen ander woord en woorden als *vertaling*, *tekening*, *lezing*, *lering* enz. hebben betrekking niet op de werking, maar op het resultaat daarvan, logisch in Esperanto dus: *tradukajo*, *desegnaĵo*, *legajo*, *lernajo*. Maar in Esperanto bestaan beide woordgroepen regelmatig naast elkaar: *skribo*—*skribado*, *desegno*—*desegnado*; *espero*—*esperado*, *traduko*—*tradukado*, *helpo*, *helpado*, *laboro*—*laborado* enz.

En toch wil dat niet zeggen, dat zij altijd even regelmatig en consequent voor de hun passende betekenissen worden gebruikt. Wel gebruikt men zo mogelijk een woord met de eenvoudige *o*-uitgang voor een enkel geval en de uitgang *ado* voor een werking van langdurige betekenis, maar de uitzonderingen daarop zijn talloos. De oorzaak hiervan is het bekende principe van „*neceso kaj sufiĉo*”, dat o.m. het gebruik van het achtervoegsel *aj* tot een minimum beperkt. In de practijk treffen we nl. vele woorden aan, die eigenlijk een werking aanduiden: *traduko*, *skribo*, *bindo*, *foso*, *desegno*, *gravuro*, *valoro*, *garantio*, *kanto*, *nutro*, *vindo*, *posedo* *havo* enz., maar die gebruikt zijn in de betekenis van een zelfstandigheid, meestal het resultaat van die werking. Grammaticaal correct zou men dus moeten schrijven: *tradukajo*, *skribajo*, *bindajo*, *fosaĵo*, *desegnaĵo*, *gravurajo*, *valorajo* enz., maar omdat die woorden te lang zijn en de betekenis meestal toch wel duidelijk genoeg is, laat men gewoonlijk *ajo* weg.

Maar hieruit volgt consequent, dat, bedoelt men dan werkelijk de handeling zelf, men ook weer niet met de eenvoudige *o*-uitgang volstaan kan, maar de uitgang

---

voor een blindelinge en critiekloze toeëigening van een foutieve stijl.

1) In onze taal gebruikt men de deelwoorden niet zo overvloedig. 2) Weer een voorbeeld, waaraan men kan zien, dat een woordelijke vertaling niet mogelijk is. 3) De aanvoegende wijs is te deftig in onze taal. 4) Ook hier moet de zin iets omschreven worden. 5) Zie: 2).

-ado behoeft. Dus niet: *la traduko de traduko* i.pl.v. *la traduko de tradukajo*, maar: *la tradukado de traduko*, omdat de handeling een kenmerk eist. Practisch komt dus het weglaten van -ajo bij de ene woordgroep neer op het gebruik van -ado bij de andere, een verschuiving dus, die, hoewel niet goed te keuren, toch niet meer is tegen te houden. Maar het gevolg is, dat de *ado*-uitgang veelvuldig gebruikt moet worden voor verbale zelfstandige naamwoorden, waar men anders gemakkelijk met de stam plus *o* kon volstaan (*traduko* i.pl.v. *tradukado*). Hierbij komt nog, dat -ado ook gebruikt moet worden om werkingen te vormen van zelfstandige stammen, daar de eenvoudige *o*-uitgang hierbij geen werking uitdrukt, b.v.: *ankrado*, *apostrofado*, *balastado*, *bandaĝado*, *bilancado*, *brosado*, enz. Practisch heeft -ado dus, naast zijn betekenis van langer duur of herhaling van de werking, ook die van eenvoudige handeling zonder meer verkregen.

Als bijzonderheid willen we nog opmerken, dat sommigen een twintigtal jaren geleden getracht hebben aan bepaalde verbale zelfstandige naamwoorden een voorwerpsvorm toe te voegen, evenals bij de onbepaalde wijs, wat zij konden motiveren met een paar voorbeelden van Zamenhof zelf, b.v.: *skribado leteron*, *legado librojn* enz. i.pl.v. *skribado de letero*, *legado de libroj*, naast *skribi leteron*, *legi librojn*. Dit gebruik heeft evenwel geen ingang gevonden en is weer spoorloos verdwenen.

(Wordt vervolgd).

---

---

## De la Administracio

La pli multaj abonantoj ricevas L.P. individue; aliaj pere de siaj sekciaj estraroj. Ĉar baldaŭ ni disponos pri adresilo, ni povos sendi la gazeton al ĉiuj abonantoj individue. Por tio ni petas al tiuj sekcioj kaj abonantoj, kiuj ĝis nun kolektive abonis, sed nun preferas individuan ekspedon, baldaŭeble informi nin pri la ĝustaj adresoj.

Krome oni atentigu nin pri eventualaj eraroj aŭ mankoj en la adresoj. Kelkaj sekcioj ankoraŭ ne informis nin pri la definitiva nombro da siaj abonoj; ili bonvolu fari tion baldaŭ.

Kaj fine: la abonmonon oni bonvole sendu ĝire au poŝtmandate.

## VI DEMANDU — NI RESPONDOS

Wat is de beste vertaling van *voorstander*, in de zin bijv. van voor- en tegenstanders van een voorstel? Kan men daarvoor *porulo* bezigen?

Tegen *porulo* in die zin bestaat geen enkel bezwaar, ook niet, dat men het zelden aantreft. De betekenis is iedereen duidelijk. Wel bestaat nog het woord *protagonisto*, dat evenwel een veel enger betekenis heeft: voorvechter, in tegenstelling met *antagonisto* = bestrijder.

## DE ONBEPAAALDE WIJS NA ŜAJNI.

Men vraagt onze mening aangaande de veelvuldig voorkomende onbepaalde wijs na *ŝajni* (*li ŝajnas esti malsana*).

*Ŝajni* is, evenals *montriĝi*, *evidentiĝi*, *resti*, *fariĝi* enz. een koppelwerkwoord, d.w.z., het dient om onderwerp aan een bijv. of zelfst. naamw. te koppelen. Al deze werkwoorden zijn eigenlijk schakeringen van *esti*, en kunnen, evenmin als *esti*, door een onbepaalde wijs gevolgd worden. Dit blijkt uit de vragen, die men dienaangaande kan stellen: *kio oni estas*, *ŝajnas*, *restas* enz. en: *kia oni estas*, *ŝajnas* enz., maar nooit: *kion oni estas*, *ŝajnas* enz., welke vraag men wel stellen kan bij alle werkwoorden, die een onbepaalde wijs achter zich kunnen hebben: *kion oni esperas*, *deziras*, *rifuzas* enz., en zelfs bij de werkwoorden van modaliteit: *kion oni volas*, *devas*, *povas*, hoewel men er dan een onbep. wijs bij denkt: *kion oni volas (havi)* enz.

De onbepaalde wijs na *ŝajni* is een naciismo, evenals die na *resti* (blijf zitten!) = *restu sidanta*, en niet: *restu sidi*.

Is voor ons gevoel *ŝajni* zonder meer wat kort, welnu, dan zegge men: *li ŝajne estas*. . . (hij is schijnbaar, naar het schijnt. . .).

# Tra nia Literaturo

## BULTHUIS KIEL RAKONTISTO.

En la milita tempo nerimarkate malaperis el niaj vicoj unu el la plej konataj esperantistoj, H. J. Bulthuis, aŭtoro de pluraj lernolibroj, simplaj legolibroj, kompilinto de krestomatiaoj, tradukinto de kelkaj teatraĵoj kaj romanoj kaj verkinto de diversaj originalaĵoj. Li naskiĝis la 15an de sept. 1865a en la groningena vilaĝo Warfum, estis doganoficisto kaj okupis sin jam en sia junaĝo pri la internacilingva afero. En 1899a li akiris la instruistan diplomon pri Volapük, sed du jarojn poste verŝajne al Esperanto.

Estas malfacile diri, kiu el la multaj laboroj, kiujn B. faris por Esperanto, estas la plej grava, ĉar krom pri verkado li okupis sin ankaŭ pri propagando, gvidis kursojn kaj funkciis kiel sekretario de la unua nialanda Ekzamena Komitato jam de ĝia fondiĝo. Krom tio li estis de 1900a ano de L.K.

En tiu ĉi skizo ni dediĉos kelke da vortoj nur al lia agado kiel aŭtoro de romanoj, en kio li akiris certan famon.

Kvankam liaj romanoj literature ne atingis vere altan nivelon, ili tamen reliefigis pro lia granda rakontista talento. Liaj ĉefaj verkoj estas „Idoj de Orfeo” (1923a), „Jozef kaj la edzino de Potifar” (1926a) kaj „La vila mano” (1928a). La unua verko atingis la plej grandan sukceson, malgraŭ sia iom tro fantazia enhavo. Tiu ĉi kaj „La vila mano” priskribas simplastile la kamparan vivon en la norda parto de nia lando.

La stilo de B. estas ĉiam simpla, flua kaj legebla eĉ por komencantoj. Multilate li montris sin imitanto de Zamenhof, iafoje eĉ tro, ĉar ankaŭ evidentajn neĝustajojn de la Majstro li senhezite imitis. Ofte oni riproĉis al li, ke li verkis ankaŭ tro nederlande, kaj ke ĝuste pro tio liaj romanoj estas tiom ŝate legataj de nederlandanoj. Grandparte oni pravus pri tio, ĉar tipaj nederlandismoj ofte renkontiĝas en liaj verkoj, speciale en liaj tradukoj. Pro tiu lasta fakto lia porjunula reverko de „Robinsono Kruso” fariĝis eĉ tre kritikinda.

La plej malforta flanko de B. ŝajnas al ni lia suprajemo dum verkado kaj tradukado; multloke liaj gramatikaj formoj ne estas ekzakte pripensitaj; nekonsekvence li uzis jen unu, jen alian formon por unu sama signifo.

Evidente tiu suprajemo evoluis pro lia iom tro fervora verkado kaj komence facile akirita populareco; ĝi estas malboneto, kiu ne mankas ankaŭ al pluraj nacilingvaj aŭtoroj. Pro tio ĝuste lia lasta romano, „La vila mano”, estas gramatike la plej kritikinda.

Malgraŭ tio oni devas konfesi, ke liaj verkoj akiris prave merititan popularecon, ankaŭ malgraŭ la fakto, ke B. ne sciis eluzi la eblojn, kiujn prezentas la Esperanta gramatiko, ke li neniam eksperimentis. Neniel moderna li estis; li verkis por legemuloj, ne por studantoj. Kaj tamen, kvankam certe ne por tiu celo li verkis, ni opinias ke ĝuste pro tiuj malmoderneco kaj konservemo liaj verkoj meritas atentan studon de literaturesplorantoj.

Ankaŭ en liaj multaj lerno- kaj legolibroj lia rakontista talento klare reliefigis. Kaj ĝuste tio faris liajn librojn tiom allogaj, ke la poste venintaj pli modernaj lerniloj, precipe en nelaboristaj rondo, neniam povis foruŝe anstataŭi ilin.

La 28an de aprilo 1945a B. mortis en Noordbroek; sed pro siaj multaj verkoj kaj gravaj meritoj li restas ĉe ni en danka memoro.

---

---

## Redakcia korespondo

Al k-do L. v. M. en H.: Dankon pro via kritiko, kiun ni utiligos plejeble baldaŭ. Letero sekvas.

Al s-ro H. A. de H. en A.: Kiel ĉi supre. Pri via iama letero pri la adverbaj participoj ni scias nenion; supozeble ĝi perdiĝis. Siatempe ni volonte ekscios vian opinion.

Al k-do G.B.B. en A.: Kiel ĉi supre. Ni ne povas tute elimini la nacian lingvon el L.P., ĉar la gazeto devas servi ankaŭ al komencantoj.

Al k-do H.P.B. en H.: Al via tre interesa letero sekvas baldaŭeble respondo.

Al k-do C.v.D. en A.: Vian prilingvan poemon ni konservos ĝis kiam L.P. estos pli ampleksa kaj povos akcepti ĝin. Pri via opinio koncerne adverbajn participojn ni samopinias teorie, sed praktike nepre ne. Pri tiu temo aperos siatempe detala artikolo.

Al k-do G.K. en V.: Laŭ via deziro ni aldonos estontece al literaturaj skizoj notojn pri la aŭtoro, resp. tradukinto. Pri Luyken sekvas ankoraŭ artikoleto.

